

Esperanto en Skotlando

Esperanto in Scotland - Esperanto ann an Alba
Aŭtuno 2017 - £2.50/€3



La rekonstruita praepoka Lago-Domo (Crannog) ĉe Lago Tay,
kiun ni vizitos dum la venontjara kongresa ekskurso.

Enhavaj Elstarajoj - Sed Morgaŭ Ĉiam Venas: John Francis -
Aspektoj de la Kulturo Dana: - Betty Chatterjee

Esperanto en Skotlando

Numero 206 - Aŭtuno 2017 -ISSN 0014-0643

Kunredaktoro: Ed Robertson

Redakcia adreso: 52 Easter Drylaw View,

Kunredaktoro: Hju Rid

Edinburgh, EH4 2QP

Administranto: Mia Casey

Telefono: 07970 156549

Rete: ed.robertson@esperanto.org.uk aŭ hju_rid@yahoo.co.uk

La redakcio bonvenigas kontribuaĵojn ĉiaspecajn: artikolojn, novelojn, novaĵojn, recenzojn, poemojn, leterojn, ktp. Limdato por la venonta kajero de **Esperanto en Skotlando: 31a de marto 2018**. Oni sendu kontribuaĵojn elektronike kiel simplan tekston aŭ uzante la formaton OpenOffice.org Writer aŭ LibreOffice Writer (senpage haveblaj de la koncernaj retejoj). Dokumentoj en la formato Word ankaŭ estos akceptataj. Se la formato aŭ tiparo uzata en via kontribuo ne subtenas ĉapelitajn literojn, diversaj surogataj sistemoj estas akcepteblaj. **Por reta numero 207:** Uzantonomo = **EeSLegulo**; Pasvorto = **PorPenso**.

Enhavo

El Katedro.....	3
Suferanta pro Gripo.....	4
Kiel lingvoj funkcias, aŭ kiu batis kiun?.....	10
Kelkaj Aspektoj de la Kulturo Dana.....	16
Sed Morgaŭ Ĉiam Venas.....	26
La Fortuna Semajno.....	37
Nekrologoj.....	43
Kalendaro.....	43

La opinioj esprimitaj en Esperanto en Skotlando ne nepre kongruas kun tiuj de Esperanto en Skotlando aŭ EAS. Esperanto en Skotlando estas publikaĵo de la

Esperanto-Asocio de Skotlando: SC042398

Prezidanto: Hju Rid

Vic-Prezidanto: Jean Bisset

Sekretario: David Bisset

Kasisto: David Hannah

Adreso: 47 Airbles Crescent,

Motherwell, ML1 3AP

Telefono: 01698 263 199

Rete: secretary@skotlando.org

El Katedro

En mia lasta redaktoraj vortoj ĉi tie, mi mencias la 750000 novajn lernantojn de Esperanto en Duolingo. Tamen, tiu cifero daŭre kreskas, kaj antaŭnelonge la nombro da anoj de ĝia esperanta kurso por anglalingvanoj superis la nivelon UNU MILIONO. Proksimume samtempe, en la Duolingo-kurso de Esperanto por hispanlingvanoj, kurso kiu lanĉiĝis multe pli poste, aliĝintoj atingis la ciferon 200000. Esperanto-kurso por portugallingvanoj prilaboratas en Duolingo, kaj espereble estos lanĉita antaŭ la Universala Kongreso de Esperanto planata por la fino de julio 2018 en Lisbono, Portugalio”.

Tiuj estas indikoj pri kreskanta intereso pri nia lingvo, kaj kvankam Duolingo allogis homojn de ĉiuj aĝoj, la aĝprofilo certe inkluzivas junajn homojn. Esperanto-asocioj (kaj ne nur en anglalingvio) nun komenciĝas rimarki flueton da nova sango pri nia afero rezulte de la kurso. Tamen, se estas pli ol unu miliono da novaj lernantoj, kie ili ĉiuj estas? Estas malfacile por olduloj kiel mi memori, sed lerni Esperanton postulas iomete da tempo, do, la rezultojn oni ne vidos tuj. Se vi kontrolos en Jutubo (*YouTube*), vi trovos videojn kiuj montras lernantojn de Esperanto en Duolingo, kiuj finis la kurson ene de 6 tagoj, aŭ eĉ TRI TAGOJ.

Ni scias, tamen, ke lerni lingvon postulas regulan ekzercadon, trans monatoj kaj jaroj, eĉ por Esperanto. Tio eblas interalie rete, la moderna ekvivalento de korespondado. Pli bone, pere de persona kontakto, kaj la nova apo por poŝtelefonoj, *Amikumu* nun facile ebligas al ĉiuj, trovi homojn apud si mem, kiuj scipovas Esperanton. La tradicia Esperanto-movado havas ankaŭ rolon, se ĝi organizas renkontiĝojn, precipe internaciajn renkontiĝojn, kie Esperanto povas esti uzata por la celo por kiu ĝi elpensiĝis.

Do, mi deziras al ĉiu, bonan esperantumadon, kaj antaŭ ĉio, bonan vojaĝon!

Ed Robertson

Suferanta pro Gripo

Mi suferis pro gripo.

Ne vir-gripo – tia malvarmumo, kviun virino eltenas dum ŝi zorgas geidojn, purigas hejmon, kaj kuiras familian manĝon post reveni hejmen de sia laborejo – mi kapablas distingi la diferencon! Vir-gripojn mi spertis jam multajn fojojn dum la vivo, kaj mi ĉiam nomis tiujn malvarmumo. Sed jen, ĉi-foje, frapis min la vera afero. Tia sternas onin plene, kaj povas trompkirli la menson. La plej simplaj aferoj ŝajnas malrealaj. Oni batiĝas en alian ekzisto-ebenon. Tiel okazis ĉe mi tiun ĉi fojon – almenaŭ mi esperas ke tiel.

En la apartamenton mi ne antaŭlonge transloĝiĝis. Mi ĵus okupis novan instruistan postenon, kaj jam forlasis mian vivon en Dundee – amikojn, koramikon, ĉion. Io mankis tie en tiu pli norda urbo sur la orienta skota marbordo. Sed jam mankadis al mi la tiea forlasita estuara medio – la proksimeco de urbovivo al la ĉirkaŭa natura en la freŝaj aroj de orienta Skotlando – kaj sekve mi hezitis trovi loĝejon vidalvide al industria. Aliflanke mi volis elekti loĝejon proksima al la laborejo, tiel ke mi povus veturi al ĝi sen dependiĝi de ne ĉiam fidinda aŭtomobilo. Kviam mi finfine trovis lokon konforma al mia buĝeto, ĝi adekvatis por miaj bezonoj, sed ankoraŭ ne havis centran hejtumon, nek duoble glacumitajn fenestrojn.

La saloneton varmigis unu karba kameno, sed la elektra konservvarmigilo en la litĉambro estis preskaŭ senefika. Dormi en ĝi estis barakto kontraŭ frideco, escepte dumsomere.

Pro la gripo mi sterniĝis tiel draste ke mi apenaŭ povis ellitiĝi. Kviam ajn mi regrimpis sub la lanugan litkovrilon post iri al la necesejo mi frostotremis kviel infano.

Mi konis neniun en la strato kviu povus min helpi. La maljunulino sube, S-ino Barnton, apenaŭ metis paŝon el sia propra apartamento. Ŝi estis tia, kvia posedas tri katojn, ĉiuj vaguloj, kaj ŝia loĝejo odoris ĉiam je fiŝoj. Unu el la katoj ŝi nomis Ĝeno, ĉar tio li estas.

La juna geparo en la alia apartamento suba estis junaj, kaj malregule enestis. Senutilaj.

Mi bezonis, do, travivan strategion. Mi estus multe pli komforta, mi rezonadis, se mi povus dormi en la saloneto apud la kameno. Kun tiu ideo mi kuŝis en la malvarma litoĉambro ŝvebanta en dormon, en vekon. Ĉiun fojon kviam mi vekiĝis mi konsideris la eblecon movi la liton tra la koridoro en la saloneton, sed ne povis fronti la penegon. Finfine, en rara momento de forto, mi tiris unue la matracon kaj poste la litkovrilojn en la saloneton, por profiti de la varmo ĉe la fajro.

Tio eluzis min kaj mi dormis dum du-tri pliaj horoj. Kviam mi vekiĝis mi trovis ke mi malsatas – kaj la fajro baldaŭ mortos. Mi vestis min, eliris en malfruan aŭtunon posttagmezon, kaj tremegante kvazaŭ mi travivas narkotomankon, mi plenigis la karbujon. Ree en la apartamento mi reflamigis la fajron. En la kuirejo mi kunmetis mikspoteton kiel manĝon kaj poste, denove eluzita, mi grimpis en la nove lokigitan liton.

Mi vekiĝis konstatante ke la fajro baldaŭ estingiĝos. Tio ne bonas. Ĉiun fojon kviam mi eliris en la malvarmon por preni karbon mi tremegis kviel epilepsia. Devis esti alia solvo. Do, post ioma paŭzo kviam mi refortiĝis, mi kunmetis ĉiujn kartonajn skatolojn lasitaj post la transloĝiĝo kaj plenigis ilin per karbo. Mi portis ilin en la domon kaj liniigis ilin apud la kameno. Mi sukcesis kunmeti sufiĉajn plenajn skatolojn por daŭri semajnon. Sed jen ĉio jam por la vespero. Mi enlitiĝis por tradormi la nokton.

La sekvan tagon mi uzis mian mallongan eksplodeton de forto por iri al la loka eta butiko kaj efektivigis la manĝaĵan programon. Mi aĉetis ĉiun haveblan ladskatolon de tomata supo kaj unu grandan brunan panon. Mi povos travivi per tio, mi pensis.

Kia diferenco tio faris! Varma, komforta – krom la missentoj kaj doloroj de la gripo – mi trovis min zorgata. Nun mi devos nur ĵeti unu-du pecojn da karbo sur la fajron kaj varmigi skatolon da supo. La fundamentojn nun aranĝinte, mi povis atenti la gravan aferon – dormon.

Vekis min la odoro de fiŝo poĉita en lakto. Damne, mi pensis, mi lasis la pordon malfermita. Mi neniel deziris ellitiĝi. Finfine, tamen, la odoro agacis min tiel ke mi trahis min en la koridoron kaj ŝlosis la pordon. Reveninte en la saloneton mi vidis Ĝenon pavpaŝantan antaŭ la kameno. Devis esti ke li glitis preter mi en la mallumo de la koridoro. Estis strange ke li faris tion. La katoj de S-ino B neniam kutimis veni eĉ ĝis vido de mia pordo. Ĉu ŝi forgesse elŝlosis lin? Mi devus porti lin al ŝia pordo, sed mi estis elĉerpita kaj volis nur dormi. Mi ne povis fortikigi min por preni lin suben, stari frost-tremanta en la pasejo dum mi atendas respondon de S-ino B, nek tion ke, kviam ŝi akceptos la katon, mi devos rifuzi ĉiujn ŝiajn invitegojn enveni por taso da teo kaj digestigan kekson.

Al Ĝeno mi diris, 'Vi havas permeson resti,' kaj glitis sub la kovrilojn.

Kviam mi revekiĝis, Ĝeno estis ĉe mia kapo rigardanta rekte al mi. Li sidis vertikale, kun la piedoj enfalditaj sub si kviel Sfinkso.

'Vi aspektas terure,' li diris.

Mi ĝemis kaj provis turni mian vizaĝon for de li. Li elmetis sian piedon kaj tiris mian nazon al li.

'Vi aspektas vere malbona,' li diris.

‘Okej, homo,’ mi plendis, ‘tio ĉi ne helpas.’

‘Vi havas gripon.’

‘Je Dio, mi scias tion. Mi doloras tutkorpe kaj volas nur dormi.’

Mia kapo ja doloris min kaj mia gorĝo ankaŭ. Mi ne volis paroli. Mi fermis kaj malfermis la okulojn malforte dum mi rigardadis al Ĝeno.

‘Songŭ,’ li diris, ‘songŭ ion bonan.’

‘Dankon,’ mi flustris.

Mi fermis la okulojn. Neniuĵ songoĵ. Venis nur malhelo kaj eskapo de la gripa suferado.

Mi vekigis malsata kun bezonego pisi. Mia gorĝo doloris kviel antaŭe kaj doloris ankaŭ la brusto kviam ajn mi tuis. Ĝeno kuŝis sinvolvite apud la kameno proksima al la fajro kviu estis nun tre malbrila. Mi metis kelkajn karbojn sur la cindrojn kaj iris al la necesejo por pisi. Reveninte en la varmon mi komencis tremi terure. Malgraŭ tio, mi sukcesis varmigi iom da supo kaj manĝi ĝin kun du tranĉoj da pano. Poste mi metis verŝeton da supo kun iomete da pano sur subtason kaj lokigis ĝin antaŭ Ĝeno sur la kamenĉirkaŭo. Li nur fortiris la nazon. Laŭplaĉe, mi pensis, kaj rampis reen el la liton por dormeti.

Ĝeno daŭre rigardis min dum li sidis sur la kamenĉirkaŭo.

‘Ĉu vi songis?’ li diris.

‘Ne,’ mi respondis.

‘Kial ne?’

‘Mi ne scias. Mi ne povas songi laŭordone.’

‘Songŭ pri Alena.’

‘Kio? Kiel vi scias pri ŝi?’

‘Vi parolas dumdorme.’

‘Mi . . . kio? . . . okej . . . kvio ajn.’

‘Ŝi scias.’

‘Hej?’

Mi fermis la okulojn sed ne povas dormi. Kvion diris Ĝeno agacis min. Ĝi daŭris tra mia kapo, resaltanta de la krania interno. Kiel li sciis pri Alena? La pensoj daŭris sed ne estis longe antaŭ ol elĉerpo – la efiko de ortomiksoviruso – silentigis miajn pensojn kaj endormigis min.

Ni piediras laŭ la promenejo en Praia de Rocha. Sed tiu ne estas Praia de Rocha. Laŭ la stilo de la domoj ĝi aspektas pli kviel greka insulo – la gipso sur la muroj de konstruaĵoj kaj antaŭkortoĵoj estas kurba kaj krudete glatigita. La farboj estas en paŝtelaj nuancoj.

Ŝi surportas bikinion kaj aspektas rava. Sed estas io misa. Dum ni iras mi sentas ŝian manon malvarmiĝi, kaj vidas ŝian haŭton fariĝi pli pala. Kviam mi rigardas al ŝi denove ŝi estas morta, sed ŝi ne haltas piediri kaj rideti al mi. Ni daŭras promeni sen paŭzo, tiu ĉi mortinta Alena kaj mi.

En la fora distanco ni vidas Colin, la viro kviu estos ŝia edzo. Ni mansvingas al li. Tuj li staras rekte antaŭ ni. Li, varma kaj vivanta, kisas la Alenan kadavron, kaj ili ambaŭ ridetas al mi. Mi turnas min kaj daŭre iras kun ili laŭ la promenejo.

Post plia el tiuj saltoj, kviuj okazas en songoj, mi estas en la urbocentra foirejo parolanta al vendisto de ĝangalaj kaskoj kaj mia frato, Stefano, marĉandas pri la prezo. La vendisto demandas ion. Mi provas diri ‘ni prenos ĝin’ en la portugala kaj mi respondas tuj, sed ŝajnas ke mi pensadas longan tempon dum mi formas la frazon en mia menso.

Subite Stefano kaj mi ambaŭ surportas kaskojn kaj piediras laŭ la promenejo kvie mi antaŭe estis, kaj mi konstatas ke tio kvion mi

fakte diris al la vendisto estis 'ni petos ĝin'. Apude Colin kun Alena, nun rozkolore sana, parolas al ni entuziasme pri la kaskoj, kviujn ili aĉetis pli frue. Mi estas dolorigita. Kiel ili povus esti tiel indiferentaj, kvazaŭ Alena neniam estis morta?

Mi aŭdis gratadan bruon kaj la sonon de tre malfeliĉa Ĝeno miaŭanta. En la koridoro mi malŝlosis supran kaj malsupran ŝlosilojn. Apenaŭ malfermiĝis sufiĉe la pordo, ol Ĝeno trastringiĝis. Mi aŭdis liajn ungojn grataĉi la ŝtonajn ŝtupojn dum li kuregas suben.

Mi rampis denove en la liton, kaj tiris varmajn lanugajn kovrilofaldojn ĉirkaŭ mi.

Venis antaŭ la mensa okulo imago de Alena aspektanta belega en ĝanĝala kasko. Sufiĉe, sufiĉe!

Ju pli frue finiĝas tiu ĉi gripo, des pli bone.

Hju Rid

Kiel lingvoj funkcias, aŭ kiu batis kiun?

Homoj rimarkos, ke mi tute ne uzis en la titolo la vortojn “***kviel**”, “***kviu**” kaj “***kviun**”, proponitajn de Hju Rid en la lasta numero de **Esperanto en Skotlando**. Mi malakceptas la proponon kiel nenecesan, kaj atentigis la vortojn kiel hipotezatajn per steleto. Kompreneble lingvo **povas** havi distingon inter demandaj vortoj kaj rilataj vortoj. Ekzemple, en la germana, oni uzas malsamajn vortojn:

*die Frau, **die** ich gesehen habe = la virino, **kiun** mi vidis, **SED**
welche Frau hast du gesehen? = **kiun** virinon vi vidis?*

Ĉe aliaj similaj “korelativaj” vortoj, tamen, la germana ne sentas devon distingi inter la du cirkonstancoj (se lingvoj entute “sentas” ion ajn).

ich sah, **wie** er gekommen ist = mi vidis, **kiel** li venis
wie ist er gekommen? = **kiel** li venis?

Fari distingon inter la du cirkonstancoj en Esperanto miaopinie estas nenecese. Malofte povas okazi dubo ĉu temas pri deklaro aŭ demando, kaj ĉiaokaze ĉe demando, la akompananta demandosigno (skribe) kaj voĉtono (buŝe) klare indikas pri kiu el la eblecoj temas, kaj inverse ilia manko ĉe deklaro indikas la malon. Se tiu distingo proponita de Hju fariĝus parto de nia lingvo, mi antaŭvidus ĥaoson eĉ ĉe spertaj uzantoj de nia lingvo.

Kelkaj homoj proponis “reformi” aliamaniere la korelativan tabelon, kaj la demando leviĝas pri ĉu la tabelvortoj, fontantaj el la Fundamento, fakte estas tuŝeblaj entute. Tion tamen, mi ne volas diri. Jes ja, se oni ne eksplicite malpermesas, tiam ĉio en ordo. Mi ja ŝatas la esprimon, kiun uzis Reto Rossetti pri la Fundamenta Gramatiko de Esperanto: **La dek ses permesoj**.

Ofta sentebla truo, tamen, ĉe la tabelvortoj estas la manko de “**ali-**”-serio, kaj vortoj kiel **aliloke**, **aliamaniere** estas sufiĉe oftaj, kaj eble indikas, ke estintus bona ideo havi aldonan kolumnon por la tabelo, kaj homoj proponis tion. Tamen, grava problemo pri tiu propono estas, ke la vorto **alie** jam ekzistas, kaj estas vaste uzata, kaj havus tute alian signifon se kreiĝus nova kompleto da **ali**-vortoj en la tabelo, kaj la rezulto estus, ke **alie** nun alprenu la signifon de **aliloke**. Ĉe la aliaj tabelvortoj **alia** estas nun tute malsama afero ol **alispeca**, kio estus la signifo de **alia** se ĝi estus en tabela kolumno. Do, reformo al la ekzistantaj **ali**-vortoj ne eblas. Sed se tiu kompleta nova kolumno ne eblas, tio ne malpermesas la kreadon de **unu** specifa nova vorto inspirita de la tabelo. La vorto **alies** ŝajnas al mi tute bona kaj utila, tuj komprenebla, kaj tute ne damaĝas la Fundamenton, kaj fakte estas jam uzata, malgraŭ la plendoj.

Lingvoj ŝanĝiĝas. Tio estas fundamenta (kaj mi intence uzas nome tiun vorton) aksiomo de lingvistiko, kiu validas por Esperanto same kiel por ĉiu vivanta lingvo. Ekzemple, homoj plendis pri la implicita seksismo de la esperanta afiksosistemo. Tamen, ĝi estas preskaŭ sama kiel tiu uzata en la germana lingvo. Ĉe germanlingvanoj, oni ne elpensis novan sistemon por la lingvo por kontraŭbatali seksismon, sed kreive uzis la jam ekzistantajn eblecojn de la lingvo. Skribe, oni ofte ne plu varbas pri **Arbeiter** (laboristoj), kaj ofte eĉ ne **Arbeiter und Arbeiterinnen** (laboristoj kaj laboristinoj), sed **Arbeiterinnen und Arbeiter** aŭ eĉ **ArbeiterInnen** aŭ **Arbeiter-Innen**, por eĉ pli egaligi la inan eblecon.

En kelkaj latinidaj lingvoj oni foje vidas la mallongigon **-@** ĉe la fino de vorto pri posteno, por indiki aŭ la inan **-a** aŭ la viran **-o** finaĵon ĉe la fino de vorto.

Ion similan ni vidas en Esperanto-kulturo: ne plu oni tiom presas en kongres-aliĝilo **viro/virino**, sed **viro/ino**, aŭ eĉ **ina/malina**, kio nun ofte aperas en aliĝiloj por junularaj esperantaj eventoj. Oni delonge serĉis ambaŭseksan sed homan pronomon en la ununombro en Esperanto. **Ri** ne sukcesis atingi amasan aŭ eĉ detekteblan subtenon, kaj eĉ malpli la propono **hi** (**li** fariĝunte tiukaze ambaŭseksa). Tamen, **ŝli** miaopinie estas tute bona. Kaj, se konservativaj lingvanoj plendas, oni povas tute senkulpe pledi, ke temas simple pri mallongigo, kaj enmeti strekon: **ŝ/li**.

Kredu min, ĉe aliaj lingvoj ol Esperanto, la afero pri seksismo povus esti pli komplika: la rusa vorto por “prokuratoro”, **prokuror**, estas laŭ **formo** gramatike vira, ĉar ĝi finiĝas per konsonanto, sed hodiaŭ tiu substantivo povas indiki laŭ **signifo** viron aŭ inon. Do, se la priparolata nova prokuratoro ja estas ina, ĉu en la rusa oni konkordigu la adjektivon ine, **novaja prokuror** aŭ vire, **novyj prokuror**? Ŝajne, neniu scias, kiu el la du eblecoj estas “ĝusta”. Feliĉe tiajn malfacilaĵojn Esperanto ne konas.

Hju parolis pri relative lastatempa nova prepozicio **na**, uzata por indiki akuzativon ĉe neasimilita (“fremda”) vorto aŭ ĉe alia vorto aŭ sintagmo kiu ne povas akcepti akuzativon, kaj mencias la protestojn de kelkaj homoj, ke tiu prepozicio estas “kontraŭfundamenta”. Tamen, la ideo, ke ne povas esti novaj prepozicioj en nia lingvo, laŭ mi, post zorga tralegado, ne troviĝas ie en la Fundamento. La plej oldaj inter ni estas sufiĉe aĝaj por memori la protestojn de la konservativuloj pri la tiam nova (sed nun grizbarba) prepozicio **far**, kiu same “ne povas ekzisti”. Almenaŭ pasintece, ĉar ĝi certe ekzistas nun. Eble mi diru “la protestojn **far** la konservativuloj”.

Parenteze, kio pri propraj nomoj? Ĉu ni lasu ilin en la originala formo, aŭ ĉu ni igu ilin nereconeblaj, sed “esperantaj” (kaj parenteze deklinacieblaj)? Mi devas diri, ke estas treege ĝene vidi en klarigoj pri kiel atingi al Esperanto-kongreso nacilingvajn loknomojn kripligitajn en pseŭdo-Esperanton. Se mi vidas, ke kongreso okazos en **Varsovio**, kiel mi sciu kiam la trajno alvenis en la ĝustan stacidomon, se mi ne scias la vorton **Warszawa**? Kaj por malpli famaj lokoj, kiel mi aĉetu bileton al kongresurbo, se oni en la aliĝilo ne diras al mi la nacilingvan nomon???

Persone, mi ne kontraŭas **na**, aŭ eble mi ankaŭ rajtas diri: “**mi ne kontraŭas na na**”, sed mi ne multe uzos ĝin. Kial? Tutsimple, mi ne trovas ĝin tre utila, aŭ pli ekzakte, ne ofte uzenda, eĉ se oni lasus proprajn nomojn senŝanĝaj. Multaj Esperanto-parolantoj opinias, ke substantivoj nepre finiĝu per **-o**. Aha, sed kio pri la problemo **Peter batis Boris**? Kiu batis kiun? Ne nepre temas ĉiam pri propraj nomoj, ekzemple en la frazo: **Multe da katoj vidis multe da birdoj**. Kiu vidis kiun? Iuj esperantaj gramatikistoj, ekzemple karmemora Geraldo Mattos, erare asertis, ke en Esperanto, tia frazo estas nekomprenebla.

Mi malkonsentas kun la analizo de Mattos, ĉar ni tute bone scias kiu batis aŭ vidis kiun. Jam eĉ ekde la ekzemplaj frazoj kaj tekstoj en la Fundamento de Esperanto, ni scias, ke la modela vortordo en Esperanto estas **Subjekto-Verbo-Objekto**, kaj do la batinto estis Peter kaj batito Boris, kaj la katoj vidis la birdojn, kaj ne inverse. Se vi ne kredas tion, konsultu vian **Fundamenton de Esperanto**, ĉar en ĝi preskaŭ ĉiu frazo kaj propozicio, kun manpleno da esceptoj, havas la vortordon Subjekto-Verbo-Objekto (SVO). Tio signifas, ke tiu vordordo SVO estas la **defaŭlta** sinsekvo supozata en Esperanto, malgraŭ la fakto, ke kvin aliaj eblecoj estas uzataj en la diversaj lingvoj de la mondo (SOV, VSO, VOS, OSV, OVS), kaj kelkaj el tiuj aliaj sinsekvoj **kelkfoje** aperas en teksto en Esperanto,

sed tio eblas nur ĉar la roloj de la frazpartoj estas klare indikitaj, kaj eblas nur se tio estus la kazo.

La ekzisto de akuzativa signo uzebla en la plejmulto de okazoj, **permesas** aliajn vortordojn en Esperanto, kaj oni **povas** ofte uzi tion por doni alian emfazon. Inverse, se ne estas indikilo pri la kazo, ni uzu nian scion pri la normala (sed ne deviga) vortordo por supozi pri la celata signifo de la frazo, ekzakte same kiel, ekzemple, en la germana. Tie kelkfoje la akuzativa kazo estas markita, ekzemple por masklaj substantivoj kiel **der Mann** (la viro), kelkfoje ne, ekzemple por neŭtraj substantivoj, ekzemple **das Kind** (la infano) kaj **das Mädchen** (jes, la knabino). Tamen, la defaŭlta vortordo en ĉefa propozicio en tiu lingvo estas ankaŭ SVO (la reguloj por subordigitaj propozicioj estas malsamaj: tie la ĉefa verbo devas aperi kiel lasta elemento); en ĉefa propozicio la verbo nepre aperu en dua loko, kaj se la kazo estas markita, oni en la germana esceptokaze **povas** uzi OVS (tamen, kiel dirite, alia regulo aplikiĝas en subordigitaj propozicioj):

Den Mann sieht das Kind

La viron vidas la infano
(nekutima vortordo, sed la objekto estas en la akuzativa kazo germane, same kiel en Esperanto)

Der Mann sieht das Kind

La viro vidas la infanon (subjekto en la nominativa kazo)

Das Mädchen sieht das Kind

La knabino vidas la infanon
(supozo pri SVO-vortordo en la germana, pro la nemarkiteco de la objekto)

Das Kind sieht das Mädchen La infano vidas la knabinon
(supozo pri SVO-vortordo en la
germana, pro la nemarkiteco de
la objekto)

Do, same en Esperanto, se la akuzativo ne estas markita, **na** ne estas bezonata, krom se povas esti miskompreno, kaj tio malofte povas okazi. Tamen, en tiuj maloftaj okazoj, jes, ĝi eble povus esti utila.

La reformo al Esperanto, kiu miaopinie tamen plej bezonatis, rilatis al landnomoj. Kaj tiu reformo, nome la uzado de la finaĵo **-io**, anstataŭ **-ujo**, delonge grandparte okazis kun akcepto kaj sukcesis, malgraŭ la lastatempa provo de la misnomataj “bonlingvistoj” retroŝalti la horloĝon. La afikso **-ujo**, delonge forgesita en Esperanto ĉe fruktarboj, estas ankoraŭ uzata de minoritato da nuntempaj eksmoduloj ĉe landnomoj. Tiu finaĵo estas ege reakcia, kaj politike kaj filozofie, precipe por esperantistoj. Kaj antaŭ jarcento ni trovis solvon al tiu eraro, nome uzi la **landon** kiel radikon, ĉu finiĝantan per **-io** aŭ en alia formo, kaj multaj Esperanto-parolantoj rezignis pri la etnisma afikso **-ujo**. Landoj **neniam** estis “ujoj” por anoj de specifaj etnaj grupoj, kun ĉiu kaptita kaj restanta en sia propra “ujo”. La mondo apartenas al ni ĉiuj, egale el kiu lando la enlandano origine venas, kaj egale pri la etneco (aŭ etnecoj!) de siaj gepatroj. Kaj tiu politiko sinteno estas hodiaŭ pli akceptata ol iam ajn. Feliĉe, malgraŭ la kampanjo de la konservativuloj, la landnoma finaĵo **-io** restas multoble pli populara ol la eksmoda **-ujo**.

Ed Robertson

Kelkaj Aspektoj de la Kulturo Dana

Tiu artikolo estas mallongita versio de mia prelego, kiun mi prezentis dum la ĉi-jara Brita-Skota kongreso en Edinburgo. Kiam mi decidis partopreni ĉi-tiun kongreson, mi tiam proponis al la aranĝantoj, ke mi rakontu ion pri la tiam fraptema vorto *hygge* (prononcu *hjuĝe*), kaj ili afable jesis. Kiam mi devis formi la titolon de la prelego, mi tiam senbride nomis ĝin: *Hygge kaj uhygge: Ŝlosiloj al la kulturo dana*. Iom post iom prilaborante la prelegon, mi komprenis, ke per tia tro ĝenerala aserto, ke ili estas ŝlosiloj al la kulturo dana, mi riskos doni malveran impreson pri Danio. Pro tio kvankam mi parolis laŭ la temo *Hygge kaj Uhygge*, mi pli singarde redaktis la titolon per la vortoj: *Aspektoj de la kulturo dana*.

Se antaŭ unu jaro iu demandus al mi, kion Britio importas el Danio? mi respondus: porkaĵojn, laktaĵojn, kuketojn, bieron de Carlsberg, danestetikajn meblojn, Lego-ludilojn ktp. Certe mi ankaŭ pludirus, ke Britoj ankaŭ ŝategas spekti danajn/skandinavajn filmojn: *Rejseholdet* (La Vojaĝteamo], *Borgen* (La Kastelo), *Forbrydelsen* (La Krimeo), *Wallander kaj Broen* (La Ponto). Tamen estis al mi surprizo, kiam la 16-an de novembro 2016 du gravaj vortaroj angla-lingvaj – *Collins* kaj *Oxford* – proklamis, ke la dandevena vorto *hygge* estas unu el la plej gravaj vortoj de la jaro. Post iom da retesplorado mi ekkonsciis, ke Britio nun ankaŭ importas la koncepton *hygge* el Danio.

Cetere la vorto *hygge* iĝas konata vorto dana ankaŭ en aliaj landoj. Antaŭ kelka tempo mi aŭdis pri esperantista vizitanto al Danio, kiu klarigis sian gastiganton, ke la plej grava celo de ŝia vizito estas, ke ŝi dezirus lerni pri *hygge*. Kroata esperantistino rakontis al mi, ke en ŝia lando oni ankaŭ radie parolis pri la koncepto

Tamen, povas esti, ke aparte en angla-lingvaj landoj oni parolas kaj scivolemas pri ĝi. Ekde la jaro 2015 estas eldonitaj minimume 17 libroj en la angla pri hygge kaj mi tute ne scias kiom da artikoloj aperis pri la sama temo. Per la ekspluato de la mojosa tendenco, oni mencias, ke butikoj vendas pantoflojn, kandelojn, lanaĵojn, manĝaĵojn ktp. Retemuloj ankaŭ ravas pri la temo. Ekzemple, unu semajno antaŭ la kongreso Instagram havis 2,5 milionojn da fotoj laŭ la temo de *hygge*.

Vi certe scias, ke fakte aŭ fantazie la popolo Dana estas la plej feliĉa popolo en la tuta mondo. Almenaŭ laŭ la esploroj de Unuiĝintaj Nacioj de la jaroj 2012-a kaj 2016-a oni taksis tiun la plej feliĉa popolo en la mondo. Kvankam parenteze laŭ la ĉi-jara esploro la popolo de alia skandinava lando, Norvegio, nun estas eĉ pli feliĉa ol Danio.

Kial Danoj kaj Norvegoj estas tiel feliĉaj? La dana Esplorinstituto pri Feliĉo (Happiness Research Institute. <https://www.happinessresearchinstitute.com/>) esploris la temon, kaj ĝi asertas, ke pro la jenaj faktoroj la enloĝantoj de Danio kaj ankaŭ de ĉiuj aliaj skandinavaj landoj estas feliĉaj.

Fido: Oni fidas unu la alian.

Sekureco: La sociala ŝtato dana lastlaste estas nia prizorganto. Ni havas protektan socio-reton.

Riĉeco: Ni estas riĉuloj, kaj tiuj kutime estas pli feliĉaj ol malriĉuloj.

Libereco: Laŭleĝe ni havas nefordoneblajn rajtojn.

Laboro kaj laborejoj: Tiuj donas al ni ne nur salajron sed ankaŭ identitecon, celon kaj sociajn rilatojn. Tiuj feliĉigas nin.

Demokratio: Danio havas bone evoluigitan demokration. La civitanoj estas partoprenemaj. Okazas bona registarado laŭ

interkonsenta opinio de la politikaj partioj. Koruptado malmultas. Tial la socio povas glate ŝanĝiĝi, kiam necesas. Pro tio, la loĝantaro estas feliĉa.

Kunteniĝemo: La danoj estas popolo tre kunteniĝema. Multaj el ni faras volontulan laboron. Propra laboremo kaj bonaj sociaj rilatoj gravas je feliĉo.

Ekvilibro: Oni scipovas ekvilibri inter la postuloj de la laboro kaj la familio.

Tamen laŭ la popola opinio, la feliĉo dana estas ne nur pro la favoraj ekonomiaj kondiĉoj ktp sed ankaŭ pro iu mistera eco dana, kiun oni ne povas mezuri – *hygge*. Do oni opinias, ke estas ia ligilo inter feliĉo kaj *hygge*. Averaĝe Danoj eĉ opinias, ke *hygge* estas eco dana kaj nur dana. Ili ankaŭ opinias, ke la vorton *hygge* eksterlandoj ne kapablas prononci. Ili plue asertas, ke oni ne povas kontentige traduki ĝin en aliajn lingvojn. Kvankam svede oni diras *mys*, norvege *koselig*, nederlande *gezelligheid*, germane *Gemütlichkeit* kaj angle *cosy*, laŭ ili, tiuj tradukoj ne tute taŭgas, kaj eble ili pravas.

Eble estas al vi pli interese, kiel oni esperantigas la tre ofte uzatan vorton *hygge*, kiu povas esti kaj verbo kaj substantivo; forma adjektiva estas *hyggelig*, adverba *hyggeligt*.

En la Dana-Esperanta vortaro de Eckhard Bick kaj Jens S.Larsen oni trovas jenajn tradukojn pri *hygge*, *hyggelig* k.s.:

hygge om en = doni al iu komforton.

hygge sig = agrable kunesti.

hyggeaften = agrabla vespero.

hyggelig = agrabla, komforta, hejmecca, intima.

hyggesnak = agrabla babilado.

hyggestund = agrabla momento.

Tamen aliaj en Dana Esperantujo ne uzas tiujn vortojn. Kiel aliaj danoj ili opinias, ke la vorto *hygge* estas netradukebla en Esperanton. Kiam ili agrable kunestas, tiam ili *ujutnas*.

Jen citaĵoj el konversacio fejsbuka inter denaskaj esperantistoj danaj kaj alilandaj:

“*Ujutn-*” estas la vorto en mia familio, laŭdire enkondukita antaŭ epokoj de P. Neergaard.”

Alia opinias: “Jes, ni ĉiam uzas la vorton *ujutne* en Danio. Eckhard Bick proponis la vorton *higelige*, samtempe mi apenaŭ aŭdis ĝin uzata.”

Alilandaj partoprenantoj de la babilado, inkluzive de unu akademiano, neniam aŭdis aŭ komprenis ĝin. Sed pro la scivolemo tiu traserĉis PIV-on kaj ne trovis ĝin. Ĝi ankaŭ ne estas trovebla en la vortaroj Esperanta-Dana kaj Dana-Esperanta. Nur unu ruslingvano komprenis ĝin, ĉar ĝi fakte estas ruslingva vorto. Li forte malaprobis ties uzadon dirante: “a uzado de la vorto estas freneza. Kial? Ĉar Esperanto estas ĉies lingvo internacia, kaj ni respektu la bonan lingvon.”

Tamen la vorto estas uzata kaj en Danio kaj en aliaj skandinavaj landoj.

En la jaro 2011-a kelkaj lernantoj ĉe Lernu demandis, kion signifas la vorto ‘*ujutna*’?

D. “*Ujutna* ŝajnas esti polaĵo. En rusa lingvo *ujutna*. Kion signifas la vorto “*ujutna*” en la angla? Mi ne trovis ĝin en la vortaro.”

R. “*Ujutna* ŝajnas esti polaĵo. En rusa lingvo *ujutna* = komforta”.

R. “*Ujutna* signifas ion, kio estas kaj komforta kaj bonetosa kaj agrabla.

Oni povas havi ujutnan vesperon kun amikoj. Trinkejo povas esti ujutna.

Komforta ne estas taŭga sinonimo, ĉar vespero ne povas esti komforta.

Bonetosa estas tro ĝenerala, ĉar ankaŭ laŭta diskejo povas esti bonetosa."

La konkludo de la konversacio estis: "Ĉar vi ja loĝas en Svedio, vi konu tiun vorton, ĉar ĝi estas sufiĉe populara inter junaj Svedaj esperantistoj."

Kiam mi demandis danajn esperantistojn, kiuj memoras la motivojn, kial Poul Neergaard siatempe elektis esperantigi la vorton per rusdevena vorto, tiam ili diris, ke estas pro la fakto, ke Ruslando kiel Danio havas longajn, malvarmajn kaj malhelajn vintrojn. Tial kaj por danoj kaj por ruslandanoj grave estas, ke oni komforte gardas sin interne de la muroj kontraŭ la malkomfortaĵoj ekstere. Tamen eĉ somere, kiam sunas kaj la tagoj longas, oni ankaŭ priskribas travivaĵojn, ekzemple agrablan kunestadon kun bonaj amikoj en la ĝardeno kiel ujutnajn.

Kiel Danoj spertas kaj praktikas la "*hygge-n*"? Jen konversacio inter dana esperantistino, K kaj mi:

Mi: Kio estas *hygge*?

K: Tio estas animstato, kiam oni ege bonfartas kaj oni tute ĉeestiĝas.

Mi: Dum kiaj situacioj vi praktikas la *hygge-n*.

K: Povas esti tiam, kiam mi estas sola, aŭ kiam mi estas kune kun bonaj geamikoj. Kaj se mi estas sola, mi praktikas la *hygge-n* per la kreado de io. Mi tre ŝatas krei ion, kudri kaj fari pupteatron. Mi faras diversajn scenejajn dekoraĵojn. Tiel mi praktikas la *hygge-n*.

Mi: Ĉu vi opinias, ke *hygge* estas nur dana fenomeno?

K: Laŭ mia opinio, Danoj opinias, ke ili havas la patenton de “*hygge*”. Sed mi opinias, ke ĉiuj homoj povas trovi situaciojn dum kiuj ili povas sperti “*hygge*” laŭ sia kulturo.

Mi: Kiam vi plejparte agrabliĝas; somere aŭ vintre?

K: Mi opinias, ke oni plejparte pripensas *hygge-n* vintre, kiam oni sekure endomiĝas, oni eklumigas kandelojn kaj oni kreas sekuran etoson hejme.

Mi: Ĉu vi opinias, ke *hygge* iel rilatas al manĝoj?

K: Verŝajne estas multaj, kiuj interligas *hygge-n* kaj bonan manĝon. Oni ankaŭ havas kristnaskan kaj paskan tradiciojn kiuj rilatas al certaj pladoj. Sed ne temas nur pri manĝoj.

K: Mi praktikas la *hygge-n* kune kun bonaj geamikoj.

Mi devas aldoni, ke laŭ miaj spertoj *hygge* estas io, kion oni praktikas nur kune kun bonaj amikoj, familianoj aŭ ŝatataj kolegoj. Plue, prefere la grupo estu malgranda. Laŭ la esploro de Meik Wiking, mia impresio estas ĝusta. Li demandis kiom da personoj necesas por ke oni agrable kunestu.

1 3%

2 20%

3 – 4 57%

5 – 10 9%

10+ 1%

ne scias 10%

Memevidente, ke oni agrable ĉeestadas, estas pozitive. Mi mem ĝuas agrable ĉeesti kune kun miaj intimaj geamikoj. Preskaŭ ĉiuj, kiujn mi konas ŝatas la koncepton. Tamen por kelkaj personoj, tiu koncepto povas esti obstaklo.

En Danio enmigrintoj frue enkapigas la adjektivan vorton *hygge*. Tamen tio ne signifas, ke ili frue spertas la danan *hygge-n*. Oni devas havigi al si bonajn amikojn antaŭ ol oni povas partopreni en *hygge-grupo*. Kaj ofte oni devas longe atendi, antaŭ ol iu amiko invitas vin partopreni naskiĝtagan feston familian, kiu cetere estas laŭ mi unu el la perfektaj ekzemploj de dana *hygge-okazaĵo*. Bongustaj manĝaĵoj hejmfaritaj, abundaj trinkaĵoj, flagetoj danaj, kandeloj, kantoj, paroladoj ŝercaj kaj nostalgiaj kaj la ŝanco renkonti la parencaron de la amiko. Tia invito signifas, ke oni estas agnoskita kiel bona amiko.

Tamen subkuŝas kelkaj negativaj aspektoj. Unu el ili, laŭ mia opinio, estas ligata al alia aspekto de neoficiala dana kulturo tradicia. Mi parolas pri la regularo de Jante, kiu estas mok-priskribo de interhomaj normoj en multaj skandinavaj kaj alilandaj socioj malgrandaj. La nomo Janto, origine Jante, devenas de la romano '*En flyktning krysser sitt spor*' ('Rifuĝinto transiris sian spuron') de Aksel Sandemose (1933), kiu temas pri la fikcia urbo de Janto. Kvankam troigante, ĝi donas sufiĉe klaran bildon de la timo de aliuloj kiu povas regi en tiaj socioj, kaj de la obstakloj por individuo, kiu ne volas cedi al la grupaj normoj.

Jen la regularo:

Vi ne kredu, ke vi estas io grava.

Vi ne kredu, ke vi egalas *nin*.

Vi ne kredu, ke vi estas pli saĝa ol *ni*.

Vi ne fiimagu, ke vi estas pli bona ol *ni*.

Vi ne kredu, ke vi scias pli ol *ni*.

Vi ne kredu, ke vi valoras pli ol *ni*.

Vi ne kredu, ke vi taŭgas.

Vi ne ridu je *ni*.

Vi ne kredu, ke oni zorgas pri *vi*.

Vi ne kredu, ke vi povas instrui al *ni* ion ajn.

(Vikipedio)

Eble pro tia sinteno, oni singarde elektu la konversaciajn temojn dum *hygge-renkontiĝoj*. Oni estu ne kritikema. Konsilende estas, ke oni ne parolu ekzemple pri politikaj aŭ religiaj temoj aŭ problemoj. Oni evitu konfliktojn. Se iu elektus temon danĝeran, la aliaj tuj tusus dirante: “Ho, ĉu ni ne parolu pri io alia?” Se la proponinto protestas dirante ke bonaj amikoj povas paroli pri ĉio, tiu rapide elkovras la malon de *hygge* (tiel rilate), kiu estas *uhygge* – ĝeniĝo. Oni ne detruu la bonan etoson parolante pri *uhyggelige* temoj, ekzemple politiko kaj religio. Se la kulpinto ne rezignas pri la temo, tiu riskas ne plu ricevi inviton.

En 2006 aperis en Danio *Kanono de Kulturo Dana* kaj en 2016 *Kanono de Danio*.

Bertel Haarder (Dana Liberala Partio), ministro de kulturo verkis la antaŭparolon por *Kanono de Danio*.

Ĝi estas edukiteco-projekta gvidlibro, kies celo estas konsciigi la civitanojn pri danaj historiaj kaj kulturaj valoroj, tradicioj kaj okazaĵoj, kiuj formis la danajn socion kaj la sintenojn de la dana popolo.

Li opiniis, ke la konscio pri la kultura heredo kaj la landa identeco estu videbla por ĉiuj civitanoj, ankaŭ novaj - enmigrintoj, ĉar ĝi utilas por la interkompreno, la konkordo kaj la integriĝpolitiko.

Fejsbuke Bertel Haarder skribis i.a pri la projekto la 27-an de decembro 2015. “La projekto aktualiĝas pro la torento da rifuĝintoj kaj la tutmondiĝo. Ni danoj ne retiros nin nur pro la fakto, ke nun venas aliaj, kiuj havas aliajn kulturajn radikojn.”

Tamen ne estis politikistoj, kiuj decidis pri la enhavo de tiu gvidlibro, sed danaj civitanoj, kiuj kunvenis, proponis, pridiskutis kaj finfine elektis la dek plej trafajn proponojn. Entute venis 2.425 proponoj. Ses fakuloj ordigis la proponojn laŭ 20 ĝeneralaj temoj, kaj meze de novembro 2016 ĉiuj civitanoj havis la eblecon rete voĉdoni.

Jen la elekto:

Liberanimeco

Seksegaleco

Sociala ŝtato

Konfido

La dana lingvo

Asocia vivo kaj volontula agado.

Kristana heredo kultura

Libereco

Laŭleĝa egaleco

Hygge

Jen la kanona priskribo de *hygge*: "La koncepto de *hygge* multe ampleksas en la konscio dana. *Hygge* estas konsiderata kiel distinga maniero kuniĝi dum malstreĉaj cirkonstancoj. Multaj personoj opinias, ke la vorto *hygge* estas netradukebla. Multaj eksterlandoj vizitante Danion tuj ekkonas la vorton kaj ĝian signifon."

Do, oni atendas, ke ĉiuj loĝantoj en Danio devas scipovi kaj praktiki la *hygge*-n. Interese estas, ke Bertel Haarder mem opiniis, ke *hygge* ne estu parto de la Kanono, ĉar la praktiko de la koncepto malhelpas liberan esprimon. Tamen li kiel demokrato akceptis la

elekton de la civitanoj.

La jaro 2016-a estis laŭ mia opinio, kiel Brito, unu el la plej ĝenaj, maltrankviligaj, timigaj, teruraj, hororaj kaj uhyggelige jaroj, kiujn mi povas memori. En Britio pro malsamaj opinioj pri Breksiĝo kaj en Usono pro la elekto de Trump kiel prezidento multaj familioj devas trovi strategion, por ke ili vivtenu bonajn kaj feliĉajn familiajn rilatojn. Kiel oni povas eviti Kristnaskajn kaj naskiĝtagdatrevenajn festojn? Povus esti, ke dum tiaj okazaĵoj la praktiko de hygge estus utila strategio. Povus esti, ke kandeloj, hejmfaritaj frandaĵoj kaj aliaj hejmecaĵoj provizore konvinkigas nin, ke ĉio bonas kaj spite tiaj politikaj kvereletoj ni ja estas familianoj, ĉu ne?

Povas esti, ke pro tio oni verkas tiom da libroj kaj artikoloj kaj promocias la koncepton.

Betty Chatterjee

Sed Morgaŭ Ĉiam Venas

(Noto de redaktoro: Dum esploro pri biografiaj detaloj pri John Francis mi renkontis Donald Makaskill, dumvivan amikon de John. Li donis al mi du prelegojn kiuj, laŭ mia scio, neniam aperis en alia eldonaĵo. La unuan mi ĝoje prezentas ĉi tie kun la permeso de Donald MacDonald, la vic-filo de John.)

La titolo kompreneble kontraŭdiras la kliŝan anglalingvan aforismon ke morgaŭ neniam venas. Ĉi tiu pravas se ni pensas nur pri la vorto mem, ĉar la vorto ĉiam validos por la tago post hodiaŭ, sed se ni fikse pensos pri tio kion la vorto difinas, tiam ĝi nepre venos. Estas afero de semantiko, aŭ simile.

Ĉe ambaŭ interpretoj la vorto reprezentas la futuron; do la titolo devas havi maltrankviligajn nuancojn por homoj kiuj pretendas vidi la futuron, krom se ni kredas ke ili neniam eraras. Se ni estas pli realismaj, interesa demando estas kiel ili daŭre evitas la konsekvencojn de siaj eraroj? Kaj estos eĉ pli interese trovi respondojn al tio. Estas du ĝeneralaj grupoj de tiaj homoj: la mistikuloj, kaj la scienculoj. “Scienculoj” estas valida termino ĉar ne ĉiu scienculo meritas nomiĝi sciencisto, kaj de la mistikuloj pli bone apartigi la profetojn ekde la komenco, ĉar profeto ne estas simple homo kiu pretendas vidi la futuron tra iu magia lenso aŭ en kristala globo, kvankam ni emas uzi la vorton kun tiu signifo, kaj “profeti” por antaŭvidi.

La vorto “profeto” origine signifis peranton, kiu interpretis la volon de dio aŭ diino al la homaro, foje inspire komuniki tion kion la dio diras, foje cedante la korpon al la dio por ke tiu parolu rekte pere de ĝi al la homaro. J. C. Wells donas la vorton “sibiloj” por la paganaj pastrinoj kiuj tiel posediĝis; kristanajn profetojn la sankta spirito

posedis. Do estis neeviteble ke foje mencio pri estontaĵoj okazu en tiuj anoncoj, kiel ekzemple veaŭguroj por homoj kiuj ne pentos kaj reformos siajn vivojn, sed tiuj estas nur partoj de la komunikaĵoj, avertoj pri tio kio povas okazi se - - - . Horoskopoj estas alia afero, kaj tiujn ĝenerale proponis individuaj pastrinoj kiuj specialiĝis pri orakoloj, kaj eremitoj kun reputacio pri sankteco — ne necese kun la sankcio de la eklezio.

Plej famaj el la orakoloj en la antikva mediteranea mondo estis tiuj de la pastrino de Apolono ĉe Delfi, kaj ĉiu pastrino aktuala — konata kiel la Pitia — demonstris unu solvon al la demando kiel ŝajni prava kiam priskribanta la futuron? Maĉante laŭrajn foliojn, ŝajne por inspiro, ŝi parolis sensencaĵon, kiun la konsultanto ne rajtis ricevi; anstataŭe grupo de pastraj spertuloj interpretis kaj konvertis ĝin en ne tre kompreneblajn versojn. Se io okazis poste al kiu ili povus, kun iom da imagopovo, havi konekson, tiam la orakolo denove pruviĝis prava.

Estis unu virino kiu ja kapablis senerare priskribi la futuron — Kasandra, filino de Priam, reĝo de Troj — sed neniu kredis ŝin, ĉar tion dekretis Apolono, kiun ŝi ofendis, akceptinte de li la kapablon antaŭvidi la futuron, sed poste rifuzante plenumi sian promeson repagi tion per amindumo. Do Apolono ne forprenis la donacon; li preferis la ironion ke ŝi retenu ion kio estas senutila, kaj eble foje timiga al ŝi. Domaĝe ke ŝi ne ekspluatis sian kapablon vidi la futuron antaŭ ol trompi lin. En la postklasika mondo diversaj homoj de tempo al tempo akiris reputacion kiel divenistojn de la futuro, sed ili devis gardi sin kontraŭ aresto kiel sorĉistoj, kiel Nostradamo, la provencala astrologo, kiu vivadis sub la protekto de Katerina de Medici. Iliaj prognozoj emas esti tiel ĝeneralaj ke estas facile akomodi ilin al tiu aŭ tiu okazaĵo, kaj iuj kiuj unuavide ŝajnas miraklaj, estas fakte memevidentaj, kiel ekzemple la prognozo ke homoj flugos, ĉar kiel mi poste montros, nura simplulo povas

facilanime prognozi veron dum konscienca spertulo eraras pri sama afero.

Hodiaŭ la pli granda grupo kiu pretendas mistikan kapablon antaŭvidi estas la ĉarlatanoj ĉe foiroj kaj aliaj lokoj kie svarmas homoj kun prema deziro elspezi sian monon kiel eble plej rapide. Ili laŭtradicie estas "Madame" sekvata de nomo kiu inkluzivas la literon "z". Ili studas siajn klientojn, decidas kion tiuj volas aŭdi, kaj certigas ke ili aŭdas ĝin. Tamen antaŭ tio ili montras ŝajne surprizan scion pri la kliento; ekzemple, ne estas malfacile reagi al virino portanta nigrajn vestojn kaj oran ringon kun simpatia "Vi lastatempe suferis grandan perdon", sed estas multaj aliaj, malpli evidentaj signoj kiujn ili povas ekspluati: bonkvalitaj vestoj kiuj tamen estas iom eluzitaj, bonkvalitaj vestoj kiuj estas relative novaj, bonkvalita ŝtofo, sed stilo tro ornamita; la prononco de la kliento, sed ankaŭ la maniero, ĉu memfida? ĉu modesta? ĉu tro konscie memfida? Kiel ŝi sidas: klinite antaŭen? apogite komforte de ia seĝodorso? ĉu ĉe la seĝa dorso, sed kun rekta propra dorso? Kaj tiel plu. Ŝi ne mencias tiujn signojn, sed utiligas ilin por priskribi al la kliento kion ŝia mistika talento montras. Aldone al tio ŝi utiligas konvenciajn frazojn kiuj tre efikas, kiaj "Viaj kolegoj ne sufiĉe perceptas la valoron de via kontribuo", kaj "Inter via parencaro estas individuo kiu kovas envion pri vi" kaj simile. Fine venas la rigardo en la futuron, kiu entenos avertojn pri danĝeretoj por aldoni konvinkon al la ĉefa novaĵo kiu estas kompreneble tre promesplena, kaj ofte okazos antaŭ iu "tri". Tri minutoj? tri horoj? tri tagoj? tri jaroj? Negrave, ĉar ankaŭ tiuj divenistinoj pri la futuro havas solvon al la demando kiel eviti la neceson fronti malĝustan prognozon. Nome, ili estos longe for antaŭ ol la fina "tri" atingiĝos.

Iom parencaj al tiuj profesiulinoj estas la amatorinoj de amikemaj rondoj: "Vi devas veni al unu el niaj etaj kunsidoj. Dorina havas veran talenton ĉe aŭguroj: ŝi korekte prognozis ke Sandra

renkontos altan belulon antaŭ tri”. “Ĉu vere? Ĉu ili fianĉiĝis?” “Nu, ne precize, sed tamen - - -”. Tiuj amatorinoj ĝenerale interpretas la aŭgurojn pere de polmoj au kartoĵoj, ĉu tarokaj, ĉu ordinaraj ludkartoĵoj. Tefolioj ne estas tiel haveblaj nun, kaj kafaj restaĵoj estas mizeraj surogatoj. Sed, indiferece pri ilia metodo, ili ne devas fuĝi pro manko de sukceso, ĉar ilia klientaro estas tolerema, kaj simple esperas pri pli da sukceso venontan fojon.

Parte mistikuloj kaj parte scienculoj estas la profesiaj vetistoj. Pli sciencemaj ol mistikemaj certe, ĉar ili fidas faktojn, ne inspiron, sed iliaj faktoj ne estas faktoj kiujn oni devas pruvi per eksperimento. La faktoj kiujn la vetisto uzas estas faktoj haveblaj al iu ajn kiuj volas uzi ilin. Homoj kiuj superece anoncas al la mondo ke nur la vetperisto povas gajni similas homojn kiuj sciigas Esperantiston ke Esperanto ne povas ekzisti. Ili ĝenerale bazigas sian teorion sur la fakton ke la vetperisto ĉiam proponas vetŝancajn proporciojn kiuj donos al li avantaĝon, sed vetistoj havas sufiĉan prudenton por scii ke li tion devas fari se li ne volas fariĝi bankrota – vetaj gajnoj estas liaj vivrimedoj.

William Hill, fondinto de unu el la plej famaj vetakceptaj firmoj, gajnis la monon por lanĉi ĝin per vetado, sed li emfazis ke estis necese studadi la geneologiajn librojn dum ok horoj ĉiutage. Tio montros kiujn kvalitojn de rapido, daŭropovo, temperamento ktp koncerna ĉevalo heredis. Aldone al tio, oni devas kontroli ĉu ĝia starta numero estas bona aŭ malbona por tiu ĉi stadiono kaj ĉu tiu havas dekstran au maldekstran turniĝon, ĉu la grundo estos mola aŭ dura, kiom da rivaloj entute? Kiom el ili danĝeras? Kiu estos ĝia ĵokeo? Dresisto? Ĉu ties stalaro estas tute libera je tuso aŭ similaj infektoj? kaj tiel plu. Kaj krom tiuj komunaj kontroloj, ĉiu vetisto havas personan rimedon certigi ke sufiĉe da liaj vetoj sukcesos. Unu homo ĉiam iras al la stadiono kun ĉevalo elektita por ĉiu konkurso sur la karto, sed kiam li gajnis celitan monsumon, li

foriras, eĉ se preferitaj ĉevaloj kuros en la restantaj konkursoj. TV programo montris tre interesan virinon kies garantio pri sukceso estis rifuzo akcepti vetproponon malpli ol tio kion ŝi konsideris akceptebla por la ĉevalo kiun ŝi elektis. Ni vidis ŝin en vetejo postulante 2.5 kontraŭ 1. Ŝi ne povis ricevi; do simple rifuzis veti, malgraŭ la horoj de laboro kiujn postulis la elekto. Jen la profesia sinteno: ili ne atendas ĉiam prognozi korektan rezulton, sed ili scias ke ilia sistemo finfine gajnos pli ol ĝi perdos. Dume la vetakceptaj firmoj prosperas pro la vetistoj kiuj dependas de nomoj kiuj allogas ilin, “bonŝancaj nombroj” aŭ komplikaj kombinaĵoj kiuj promesas grandajn gajnojn kontraŭ modesta spekulacia sumo. Ili estas la mistikuloj de la vetanta mondo, kaj la vetakceptaj firmoj tre amas ilin.

Kaj nun al la scienculoj kiuj ne estas sciencistoj! Ili ĝenerale estas verkistoj, precipe tiuj kies verkoj klasifikiĝas kiel sciencfikciaj, kategorio kies ekzisto ni povas atribui al Herbert George Wells. Kvazaŭscienca fikcio ja aperis antaŭ Wells, sed ĝi estis pli kvazaŭa ol scienca; ekzemple, en la deksepa jarcento iu priskribis vojaĝon al la Luno dum kiu oni haltis ĉe diversaj tavernoj por refreŝigi sin. Wells, kiu sincere interesiĝis pri scienco, prezentis verkojn kun detaloj kiuj celis persvadi pri almenaŭ la ebleco ke tio kion li pritraktas povos iam okazi. Li certe sukcesis doni al la lingvo* la adjektivon “Wellsian” por priskribi ion preternormale avangardan. Tamen li ne ĉiam celis priskribi preternormalajn eventojn; ekzemple, *Kipps*, unu el liaj plej amataj verkoj, simple priskribas la sociologiajn reagojn al juna drapista dungito kiu neatendite riĉiĝas, dum verko kia *Milito inter la Mondo*, kvankam fantazia, povus okazi kiam ajn. Aliflanke, li ja pretendis ke li antaŭvidis tankojn dek jarojn antaŭ ol oni inventis ilin, kaj lia *Milito en la Aero* almenaŭ agnoskis ke tia povos okazi, dum la filmo *Aspektoj de Venontaj Okazaĵoj*, kiun li verkis, eĉ antaŭvidis 1940 kiel la daton de la venonta milito, kaj tio

ja estis sufiĉe preciza. Estas interese ke lia priskribo pri ĝiaj sekvoj tre similas tiujn kiujn oni poste prognozozos kiel la sekvojn de Tria Mondmilito: tutan disfalon de la civilizio, sed kompreneble tia tuta disfalo ne okazis post la vera Dua Mondmilito, kaj la mondo kiun li priskribis leviĝintan el tiu disfalo eĉ pli devias de tio kio efektive okazis, ĉar Wells priskribas mondon de la futuro kiu spegulis lian tipan optimismon: mondon kie ekzistas vere civilizitaj homoj kaj la venko de scienco super la malsanoj kiuj jam ne plagadis ilin – eĉ ne malvarmumo. Cetere, li faris nekarakterize malsciencan sugeston pri metodo lanĉi ŝipon kun la plej perfekta homparo al la astroj, proponante pafi ĝin el giganta kanono. Kompreneble, tia lanĉo garantius unu rezulton: la plej perfekta paro en la mondo ĉesus esti perfekta eĉ antaŭ ol lasi la kanonan buŝon.

Estas strange ke Wells faris tian proponon, ĉar longe antaŭ tio li sugestis metodon de ekstertera vojaĝado kiu eĉ hodiaŭ havas teoriantan validon. En lia Unuaj Homoj sur la Luno li proponis sferon el kontraŭgravita materialo. Ĝi kovriĝas de metalaj rulkurtenoj, kaj por lasi la teron la vojaĝantoj devas nur forruli tiujn frontantajn la teron por certigi ke, sen la tirado de gravito, la sfero kompreneble leviĝas kaj fine lasas la teron malantaŭ ĝi. Manipulado de aliaj rulkurtenoj certigas ke la luna gravito altiros la sferon *al* ĝi.

Du romanoj en kiuj homoj veturis ne al la astroj sed en la futuron estas *La Dormanta Vekiĝas* kaj *La Tempomaŝino*. La unua priskribas kiel homo dormas dum du jarcentoj, kaj vekigatas por trovi ke li pli-malpli posedas la mondon, ĉar dum lia dormado lia kapitalo daŭre kreskis, kaj oni ne povis haltigi tion, ĉar li ne estas morta. La tempomaŝino veturas ĝis multe pli dista futuro, kie la veturisto renkontas homidojn pli belajn, sed ankaŭ pli delikatajn ol tiuj de la mondo kiun li lasis. Ili ankaŭ havas infanan indiferenton pri la sortoj de aliuloj, kaj faras nenion por akiri vivrimedojn, ĉar tiuj mistere aperadas sen iu peno iliaparte. Fine li trovas ke provizas ilin

malbelegaj kvazaŭhomoj kiuj normale loĝadas sub la tero, kaj aperas sur la surfaco dumnokte por lasi manĝojn, kaj kompanse forpreni delikatulojn por propra manĝo. Wells mem ne kredas ke tiuj mondoj iam ekzistos: li uzas ilin por kritiki la socion aktualan, indikante la absurdon de mono kiu kreskadas kaj faras nenion, kaj la logikan finon de sistemo kie riĉuloj fariĝas pli kaj pli senutilaj, kaj la laboristoj pli kaj pli bestigitaj sub kapitalismo.

La Tempomasino kvazaŭ faras duoblan prognozon: ĝi faras prognozon pri tre dista *fantazia* futuro, kaj ĝi faras prognozon pri pli apuda futuro en kiu homo inventas maŝinon kiu povos veturi ne tra spaco, sed tra tempo. Li provas pravigi la eblecon per la analogo de rivero en kiu diversaj lignopecoj, aŭ simile, flosadas. Se unu flosas meze de la rivero kaj dua flosas unumetron al ĝia dekstro kaj du metrojn malantaŭe, ili daŭre retenados tiun rilaton, ĉar ili ambaŭ fluas je sama rapido, kaj samaj kondiĉoj validos se ni aldonos trian kaj kvaran; do la kvar retenos neŝanĝantan formacion. Tio, asertis Wells, estas analoga al objektoj kaj homoj en la prezenco, sed metu motoron sur unu el ili, kaj tiu lasos la aliajn, irante nun pli rapide ol la rivera fluo, kiel tempomaŝino povos pli rapidi ol la tempofluo kiam oni inventos adekvatan motoron.

Do neta, kaj eĉ persvada, klarigo! Hodiaŭ tamen ĝi ŝajnas nekredeble naiva kaj primitiva, ĉar ni jam ne kredas pri tempo kiel speco de fluanta rivero. De la tempo kiam oni atentigis ke movo eblas nur kiam ekzistas io *senmova* kontraŭ kiu mezuri, eĉ percepti, la movon, oni devis akcepti ke tempo kiu fluas kiel rivero bezonas bordon de kiu observi la flumovon. Sed la observanto sur tiu bordo mem ekzistas en propra tempofluo, kiu ankaŭ havos bordon, kaj tiel senfine plu. Tempo estas treege komplika dimensio, kaj hodiaŭ la sola akceptebla teorio pri tempovojaĝo, kiu ne envokas paralelajn universojn, ekspluatus la pruvitan interrilaton inter tempo kaj rapido: por la vojaĝantoj en rapideganta stelsipo tempo pasas pli malrapide

ol sur la planedo kiun ili lasis, kaj simile.

Kaj kompreneble tempo kiu fluis kiel rivero enhavis tro da anomalioj. Estas la klasika ekzemplo de tempovojaĝanto kiu mortigas propran avon antaŭ ol tiu generis la infanon kiu generos la tempovojaĝanton kiu mortigos sian avon. La tempovojaĝanto de Wells estas en la futuro dum semajno, kaj kiam li revenas li alvenas inter siaj amikoj precize semajnon de kiam li lasis ilin. Sed kial? Kial ne daŭrigi la vojaĝon reen ĝis la momento kiam li lasis ilin. Tiam ili ne scius ke li foriris, kaj se li daŭrigus sian vojaĝon reen ankoraŭ kelkajn momentojn, li estus lasinta la maŝinon ĝustatempe por renkonti sin enirontan ĝin.

Do Wells faris malmultajn ekzaktajn prognozojn, sed li indikis temojn kiuj interesos futurajn generaciojn, temojn kiujn lia propra generacio ofte rigardis kiel puran fantazion. Pli ol tio: li inspiris tutan novan genron de literaturo, ĉar la inspiritaj aŭtoroj ne kontentis simple verki rakontojn pri la futuro, sed kiel Wells mem, ili uzis siajn verkojn por komenti pri aktualaj tendencoj. Dum la kvindekaj de la pasinta jarcento ili multe traktis la rezultojn de nuklea milito. Poste, estis multaj rakontoj kiu emfazis kiel erare estis konsideri nin la solajn modelojn por inteligenta vivformo. Iu novelo priskribas stelŝipon en kiu inteligentaj, sensitivaj fuĝantoj de mortanta planedo diskutas kiel ili kondukos por ne iel malutili al la vivo de la planedo kiun ili fine elektos kiel sian novan hejmon. Je alveno, ili spertas kelkajn timigajn travivaĵojn, kaj fine provas defendi sin, sed iliaj armiloj simple iritas la viron kiu metis ilian ŝipon en sian ĝardenan budon, kaj nun konstatas ke ĝi enhavis tiujn pikantajn bestetojn kiujn li do sukcese likvidas per ĝardenaj ŝprucigilo. Alia novelo estas preskaŭ korolaro de tiu. Du teraninoj ŝprucas arbustojn por mortigi insektojn, pli-mapli ignorantaj la gigantajn eksteranojn al kiuj ili jam kutimiĝas; do kiam unu diras “Kion ili faras nun?” kaj la alia respondas “Ili saĝe faras nubojn”, ne trafas ilin ke ili fakte ŝprucas

iujn iritaĵon ĉirkaŭ siaj piedoj kiujn ili povas senti, sed ne vidi.

Estas centoj da tiaj noveloj, sed unu romano kiu montras la aktualan sintenon al tempo dufoje, laŭ du vidpunktoj, estas *La Fino de Infaneco* (Childhood's End) de Arthur Clark. En tiu, la ŝipegoj de supera civilizacio, konata kiel la mastroj (laŭlitere la feŭdĉefoj) ŝvebas super la tero dum jardekoj, certigante interalie ke la homaro kondutas laŭ propraj kriterioj pri virto, sed neniam montrantaj sin ĝis ili decidis ke la homaro estas preta. Tiam ilia ĉefo montras sin, kaj estas evidente kial ili tiel longe prokrastis aperi: de la kornoj ĝis la sagpinta fino al la vosto tiu ĉi estas la formo kiun homoj ĉefe timegis dum jarcentoj kiel la koncentriĝon de malbono, la diablon. Sed tiu ĉi formo ne estis timigita kiel rasmemoro transdonita de generacio al generacio; ĝi estis timigita kiel la formo kies apero en la futuro signalos la finiĝon de la homaro. La mastroj mem ne povas plu evolui; ilia tasko estas prepari la homaron por metamorfozo kaj kunfandiĝo kun la fonto de energio kiu lokiĝas sur ilia planedo kaj kiun ili servas. Unu homo vidas tion, ĉar li sin kaŝis en mastra ŝipo dum vojaĝo al ĝia hejma planedo kaj reen al tero, kaj pro la necesa rapidego de tiu vojaĝo tempo pasis por li pli malrapide, kaj li tiel retenas sian homan formon ĝis kiam li revenas al tero longe post la morto de siaj samtempuloj por vidi la transformiĝon je kiu la homaro lasas sian infanecan fazon.

Ĉe sciencISToj estas iom malfacile: famaj sciencistoj de la paseo famiĝis ne ĉar ili prognozis, sed ĉar ili faris; alivorte, prognozo supozeble venis antaŭ faro, sed estas la faro kiun ni konas. Estas alia malfacilo: ĉu tiu sciencisto efektive eltrovis tion aŭ inventis tion, aŭ ĉu iu alia devancis lin? sed ne ricevas la aklamon kiun li meritis? Newcomen, Davey, Lister, Simpson, Baird estas nomoj kiujn ni ĉiuj rekonas, sed en alia lando ekvivalenta listo povus konsisti el tute aliaj nomoj, kaj eĉ kie oni universale agnoskas nomon ĝi ne ĉiam elstaras klare, pro la pretendoj pri aliaj kontribuoj kiuj eble same

gravis, kaj tiel plu. Cetere, dum la pasintaj cent jaroj ne temas pri individuoj, ĉar la scienco estas tiel komplika ke necesas grupoj de specialistoj subtenata de universitato, aŭ simlie, por atingi ion, kaj kvankam foje individuo aŭ paro meritas apartan aklamon, ni ne scias ĉu ili en la komenco prognozis la sukcesan rezultaton.

Tamen foje individuo kun reputacio ja faras klaran prognozon. Unu tia estis Sir James Jeans, fizikisto, matematikisto, esplora asociulo ĉe la Mount Wilson Observatorio, kiu en la tridekoj de la pasinta jarcento pruvis per matematiko, aplikita al la fizikaj faktoroj, ke interplaneda vojaĝado estas neebla ĉar la rapido necesa por venki graviton kaŭzus tian frikcion kun la atmosfero ke la ŝelo de la ŝipo simple fandiĝus. Tio estis vere konvinka, ne nur pro la impresa fono de la individuo, sed pro la uzo de la matematiko, plej preciza el la sciencoj, fakte nerefutebla. Tamen ne ĉiuj akceptis la prognozon de Sir James. Unu kontraŭulo estis lerneĵano, kiu jam akceptis la matematikan veron ke kvar de tri neebblas; pruntu unu. Sed lia rifuzo akcepti la neebulon de interplaneda vojaĝado ne devenis de lia matematika scio, sed de la fakto ke interplaneda vojaĝado estis konstanta temo de noveloj, romanoj, ĵurnalaj artikoloj kaj specialistaj tezoj, kaj li ne povis imagi futuran mondon kiu rerigardos al tempo kiam oni staris sur la sojlo de io kio neniam realiĝis. Kiel mi jam diris, ne necesis klarvida talento por prognozi ke homoj flugos, ĉar homoj konstante aspiris al tio, malgraŭ la ŝajna neeblo.

Kaj la matematikaj kaj fizikaj kalkuloj de Sir James estis korektaj. Lia sola eraro estis ne antaŭvidi la futuran enkondukon de materialoj kiuj ja povos toleri la temperaturojn kaŭzitaĵojn de frikcio. Io simila okazis kiam specialistoj pri la aeronaŭtiko asertis eĉ ĝis ĉirkaŭ 1929 ke aeroplano neniam flugos pli rapide ol du cent mejlojn pohore, sed nur dek jarojn poste aeroplano gajnis la Schneider Trofeon atinginte rapidon de kvarcent mejlojn pohore. Helicoj dume sanĝiĝis.

Kaj ne mirinde ke eĉ spertuloj eraras kiam ni memoras ke la spacoŝipoj sendantaj signalojn de la cirkaŭaĵo de la plej distaj planedoj de nia sistemo uzis aparaton kiu jam estis eksmoda al la homoj kiuj ricevas la signalojn. La tempo jam alprosimiĝas kiam prognozo pruviĝos erara eĉ antaŭ ol oni erare faros ĝin. Tion mi memfide prognozas.

John Francis

**Temas pri la angla lingvo.*

La Fortuna Semajno

Jam, la kutimo klariĝis: ordono iri alilanden, skribo al la lokaj esperantistoj. La lando: Hispanio. La loko: Madrido. La semajno: tre fortuna.

Mia lasta kaj sola vizito al Hispanio estis dusemajna aŭtovojaĝo kun mia edzino antaŭ ses jaroj. Mezsomere, ĝi estis veturo tra malkapabliga forn-varmego, de la suda dezerto al la mirinda ĉefurbo Madrido, tra diversaj belaj urboj kiel Grenado, Sevilo, Salamanko kaj aliaj. Ĝi estis ĝuinda vojaĝo, sed Hispanio estis, tiam, al mi, fremda. Mi ne antaŭe konis la landon. Mi ne parolis la lingvon. Mi ne konis landanojn.

Tamen, kiam mi malkovris la pasintan jaron, ke mi devos iri al Madrido pro mia laboro, estis malsame. Mi ankoraŭ ne parolis la lingvon nek konis landanojn, sed dankon al Esperanto tiuj faktoj ne gravis.

Mi rete trovis kaj kontaktis la hispanan asocion, kaj demandis ĉu, dum la decembra semajno de mia vizito, iuj volus renkonti.

La respondo ne nur jesis, sed informis min ke estos fortuna semajno, kun interesaj okazoj por Esperanto en la urbo dum ĉi-tiuj tagoj.

Okazis la kvincenta datreveno de la morto de la fama hispana verkisto Cervantes, aŭtoro de la rakonto de Don Kiĥoto, mezepoka hidalgo kies aventuroj kaj pensoj elstaris kiel grandege influa parto de hispana literaturo. Mi apenaŭ sciis pri Cervantes, Kiĥoto aŭ la enhavo de la romano, sed – kiel ĝi faris por mi por Madrido – Esperanto transpontigis min al iom pli da kono.

Mia korespondanto en la madrida klubo kiu respondis al mia

retmesaĝo, Manolo, klarigis al mi ke du eventoj okazos dum mia vizito. La unua estos grava prezentado ĉe la nacia biblioteko de multlingva versio de Don Kiĥoto, kun legado de pecoj en diversaj lingvoj, inkluzive Esperanton. La dua estos la lanĉo de nova bitversio de la fama libro, kun Zamenhoftaga manĝo sekvonta.


Kompreneble, mi jesis al ĉiuj invitoj. Je la unua okazo, post longa promeno de mia hotelo tra la belaj stratoj de Madrido kaj la strangege varma decembra vespero, mi trovis min ĉe la anoncita renkontloko, gigantaj flagoj sur granda placo apud la grandioza nacia biblioteko, kie mi kaj mia ankoraŭ tro malrapide pliboniĝanta Esperanto renkontis grupon de la lokaj samideanoj.



Tie, en bela ĉambro inter eble du cent homoj, Manolo sidis apud

mi kaj tradukis la okazojn. Dum la vespero, post longa enkonduko pri la graveco kaj univesaleco de Kihoto, ĉirkaŭ dudek homoj, eble eĉ pli, antaŭenpaŝis al pupitro kaj mikrofono kaj prezentis mallongan ĉerpaĵon el la libro en sia lingvo. La lingvoj inkluzivis ne nur diversajn lingvojn el Eŭropo kaj la pli vasta mondo, sed multaj dialektoj de la hispana lingvo. Ofte sekvis entuziasma aklamado, spegule de la diversa mikso de la spektantaro. Mi rimarkis al Manolo ke klare estis speciale granda amaso da homoj el la regiono Leono en la domo tiun vesperon.

La legado nature enhavis Esperanton, ĉi tiun pecon legata de fama hispana Esperantisto, kies nomon mi ie legis antaŭe, Toño del Barrio. Mi renkontis lin, kaj kelkajn aliajn madridajn Esperantistojn poste en apuda taverno kie, super bieroj kaj tapoj, ni babilis tra la restanta vespero.



Mi ĝojis lerni multe pri la movado en Hispanio, pri Cervantes kaj, nesurprize, pri la granda libro centra al la vespera evento. Toño montris al mi sian ekzempleron de la peza verko, kaj speciale la du skotajn pecojn: en la skotlingva, Ayrshire dialekta, tradukata de la universitatano Hugh O'Donnell, kaj en la skotgaela, de la verkisto Martainn Mac an t-Saoir (Martin MacIntyre). Tie, en Madrido, en la koro de ĉi tiu ekzemplo de la plej fama libro de Hispanio, sidis eroj de Skotlando.

Tri tagojn poste okazis la dua evento: la lanĉo de la unua bitversio de Kiĥoto. Tio okazis en la simile grandioza hejmo de la Instituto Cervantes, la hispana kultura kaj lingva organizo kiu ekvivalentas la Britan Konsilon.

Denove, Toño havis gravan rolon, apud aliuloj de la hispana Esperanto-federacio kaj ekspertoj de la instituto mem.



Aferoj okazis en la hispana lingvo, sed mi ricevis helpon ĉar mi antaŭe renkontis kaj travespere apudsidis maljunan madridan viron nomiĝe Diego, kiu revenis hejmen por ferio el Majoto, eta franca insulo proksime al Madagaskaro en la Hinda Oceano, pri kiu mi neniam aŭdis, kie li instruis la hispanan en lernejo. Ŝajnis ke tiu estis malfacila kaj ne tute ĝuinda vivo por li, malgraŭ tio ke estis ne por-ĉiama laboro. Sed lia laboro por la vespero estis fojfoja flustra traduko al mi tiel ke mi povu kompreni iom de la evento.

La prelegantoj enkondukis Esperanton (iu diris al mi ke la spektantaro estis ĉirkaŭ duone neesperantista) kaj priskribis la historion de Kiĥoto en Esperanto kaj la gravan klopodon de la originala tradukisto de Kiĥoto en Esperanton, la forpasinta verkisto Fernando de Diego, kies versio fariĝis la bazo de la bitversio. Kaj finfine okazis legado el la libro.



Poste, estis la Zamenhofa manĝo, en proksima restaŭracio. Je mia hororo mi malkovris ke ĝi estis vegetarana, sed la vespero saviĝis pro tri malvarmaj bieroj kaj la ĉarma kompanio de aro da ege interesaj homoj. La pli vasta madrida esperantistaro inkluzivis fascinajn ulojn, ekzemple usona sciencisto, nova en la urgbego kaj komencanto en Esperanto, kiu almenaŭ forprenis de mi la pozicion de la plej malaltnivela parolanto de nia grupo; profesoro de la araba lingvo kies priskribo pri Esperanto en la araba mondo estis ege interesa (“estas ne multe, mi konas nur manplenon”); veterana aktivisto de la blinda esperantista movado; kaj unu aŭ du novaj parolantoj aliĝe al la lingvo per la nova kaj grava vojo esperanten, Duolingo.

Ĉe la fino de la vespero, mi havis multe da novaj amikoj kaj kontaktoj en tiu urbo kie, ĝis tiam mi konis neniun kaj kies lingvon mi ne parolis.

Sed, la ligo daŭras. Antaŭ nur kelkaj semajnoj mi gastigis unu el

la grupo kiu ferie vizitis Skotlandon. Kaj mi ankaŭ pli konatiĝas kun la ĉefulo de la semajno, Cervantes mem. Mi progresadas malrapide sed kontente tra la Esperanta bitversio de Don Kiĥoto, lernante pli kaj pli pri la eco de mezepoka Hispanio, la koro de hispana literaturo kaj la saĝeco (aŭ malsageco, pri kio la libro temis, kiel diris al mi Toño) de homoj.

Tamen, kiel mi lernis dum tiu fortuna semajno, oni verŝajne neniam plene aprezos Kiĥoton ĝis tiam, kiam oni legos ĝin en la skota aŭ gaela...



Simon Varwell

Nekrologoj

Ron Calder (1928-2017): Estis malĝojige aŭdi pri la morto de tia multe amata bravulo de nia movado. Plena nekrologo jam aperis en *La Bulteno*. Niaj kondolencoj al la familio kaj amikoj.

Marjorie Boulton (7 May 1924 – 30 August 2017): Malgajigis nin ricevi la informon pri la forpaso de Marjorie Boulton unu el la plej elstaraj poetoj de la Esperanto-movado. Mankos ŝi terure al la multaj britaj Esperantistoj kiuj konis kaj amis ŝin dum ŝia longa poresperanta vivo.

*

Kalendaro

Decembro 2017

sab. 2 de decembro

La Zamenhofa Festo de la Esperanto-Asocio de Skotlando okazos la 2an de decembro en la hotelo Bentley, Motherwell, de 12.30. La temo estos: Festa Viziteto al Nov-Jorko!

februaro 2018

dim. 11. - sab. 17. de februaro 2018

9-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto - en Havano, Kubo. Inf.: Kuba Esperanto-Asocio, kubesp@enet.cu

aprilo 2018

ven. 13. - mar. 17. de aprilo 2018

99a Brita kaj 3a Tutkelta Kongreso de Esperanto, Morlan Centre, Aberystwyth, Kimrio.

Inf.: esperanto.org.uk/eab/eab_events.htm#events_2018

majo 2018

16 - 23. majo

[Mirinda Lviv](#) - Lviv, Ukrainio. Esperanto-renkontiĝo, kies celo estas plialtigi la lingvonivelon de partoprenantoj kaj konatigi ilin kun la kultura ĉefurbo de Ukrainio.

Inf.: Volodimir Hordijenko, p/k 35, Kijiv-133, UA-01133, Ukrainio.

Rete: volodomir@ukr.net

junio 2018

15 - 17. junio


[Skota kongreso de Esperanto](#). La 113a Skota kongresoj de Esperanto okazos en 'The Royal George Hotel', Tay Street, Perth. Ni ekskursos la sabaton al la Crannog Centre – Lagodoma Centro – ĉe lago Tay. Plej verŝajne okazos ekskurso postkongresa lundon la 18an de junio.

julio – aŭgusto 2018

28 julio- 4 aŭgusto 2018

[103a Universala Kongreso de Esperanto](#) okazos en Lisbono, Portugalio.

Skanu la suban kodon por eki
konversacion kun nia paĝo en
Facebook



Skanu la suban kodon por
trovi nian retejon

